

4<sup>a</sup> trimestro 2014

En tiu numero  
vi legos..

TENDEMA VIZITO DE IRLANDO  
(fino)

La tendema vo-  
jaĝo de Johano-  
Jakobo en ir-  
lando finiĝas. p.1  
En kiu lando li ĝis  
promenigos nin p.4  
venonfoje ?

Partopreni en  
Universala Kon-  
greso estas tre  
bona okazo ami-  
kiĝi kun ekster-  
landaj esperan-  
tistoj. Jacques p.5  
relegis siajn ĝis  
dokumentoj por p.7  
doni klarigojn al  
la unuafojaj  
kongresanoj.

Okaze de la ko-  
muna vesper-  
manĝo dum la  
Festivalo de  
Lingvoj, Jean-  
nine regalis nin p. 8  
per spinaca sa-  
lato, kies re-  
cepto ŝi donas  
al ni. Ŝi aldonas  
tium de kaŝtana  
supo.

Bérenĝère pro-  
ponas pirami-  
don, en kiu oni p. 8  
lokas vortojn,  
kiuj pli longiĝas  
de unu ĝis 8  
literoj

AL DINGLE

Frumatene ni forlasas tiun  
amindan, paceman havenon. Port-  
magee dormas, sed magias anko-  
raŭ. Ni aliras la insuleton Valen-  
cia trapasante ponton, sub kiu la  
unua ŝnurego ligis Eŭropon al la  
Nova Lando en la jaro 1858, nas-  
kante la eraon pri komuniko inter  
longaj distancoj. Sur tiu insuleto,  
la vojaro estas ebena kaj borda-  
ta de gigantaj rododendroj ; of-  
te staras arbaroj plenaj je tiuj



floroj... ĉu floroj ; ĉu arboj ? ne-  
niam ni vidis tiajn grandajn vege-  
taĵojn, la irlandanoj hejtas la do-  
mojn per ĝi kaj torfo transfor-  
mita en premitaj brikoj. Ni uzas  
pramon en Knights Town.

Vojrande, aperas biciklmaga-  
zeno en kiu, verŝajne mi trovos  
ripariston. La espero revenas en  
mian koron. La estro de la vojaĝa  
komizo telefonas al liveristoj.



Dank'al ŝanco... kaj persisteco, la miraklo  
okazas, la peco estos ĉi-tie morgaŭ. Mi  
foriras piede, mi havas la impreson forlasi  
la ŝipon. Morgaŭ ni ĉeestos frumatene sur  
loke... Ni



atendos dum  
5 horoj la  
liveriston.  
Ĉirkaŭ la 2a  
posttagmeze



liveraŭto  
haltas, ĉu la  
peco estas  
en ĝi ? la es-  
tro mansi-  
gnas « ne »,  
mi havas la « spiritstaton en la ŝtrumpe-  
toj », mi ekirontas... kaj denove la miraklo  
okazas, la estro ne vidis mian pecon, kiu  
estis tro eta, li povos senpaneigi la pedal-

sistemon. Savata mi estas, mi donacas 2 botelojn da vino, unu por la estro, unu por la vojaĝa komizo. Ekde nun ni povos premadi forte la pedalojn sen timi.

Post kelkaj kilometroj ni renkontas sur muro kaj marborde, 2 muzikistojn, kiuj distilumas tradician muzikon. Ŝi muzikas per ĉu ŝalmo, ĉu harpo (muzikiloj faritaj de ŝi). Li, mu-



zikas per gitaro. Ili estas gefratoj kaj kantas "Diec" bone. Ni aĉetas KD-jn por memori tiun neforgeseblan momenton. Ni povas diri ke, kiam talento kaj laboro renkontiĝas ili faras mirindaĵojn. Irlandanoj estas popolo kun radikoj kaj ili fieras pri tio.

Kun malpeza koro ni iras al Dingle... por trankvili en la junulgastejon. Sur la duoninsulo okazas biciklurado, piedkurado; la irlandanoj estas sportemaj, sed ili sportas iel ajn. La junulgastejo estas plenŝtopata je sportantoj. Kvankam la manĝo okazas en la manĝejo, la dormo okazos subtende... la « midĝiz » atendas nin.

### DUONINSULO DINGLE

Iom post iom, la vojo soras progresive. Biciklurado okazas sur nia irvojo, la partoprenantoj preterpasas nin, mi provas postkuri ilin sed ne sukcese. La maro nin akompanas. Ni haltas ĉe kabo Sleah Head sub la protektemaj okuloj de Maria Virgulino. La vidaĵo estas 360 gradojn sur disŝira marbordo. La maro estas semita de multaj in-



suletoj, rifoj. Bela loko por ŝippereo, nun mi komprenas kial la Virgulino staras ĉi-tie, ŝi gardas la lokon por ke ŝipoj ne sinku. Ni malkovras la ebenaĵon bordatan per altaj klifoj, kiuj ondumas en la malproksimo, ili spitas la oceanon kaj provas rezisti. Kiam ĝi koleras, kiam ĝi ŝtormas la spektaklo devas esti neforgesebla. Sunas, ankoraŭ ĝibo transirota kaj ni revenas al Dingle, ekirejo al Conor Pass (he jes, ankoraŭ unu montpasejo). Ĉe la supro, du rekompensoj atendas nin : 1<sup>e</sup>, glaciaĵ-vendisto faras nian feliĉon, 2<sup>e</sup>, la panorama vidaĵo al Owenmore Valley, prisemita de 3 malhelaj lagoj. Memorebla momento.

La haroj en la vento (sub la kasko), ni glitas dum pluraj km sur vojeto mallarĝa. Ni atingas la urbon Tralee. Ĉe maro ni tendumas en agrabla tendumejo, kiu altiras nin. La estro estas bonvenema kaj eksplikas al ni kial la indikpaneloj, en Dingle ĉefe, estas skribitaj nur



en la gaela. La aga politiko pri respubliko en Irlando estas forpelanta ĉiujn vortojn en la angla,

oni komencas la forviŝon de anglaj spuroj. En tiu Irlanda sud-uesta parto oni parolas la plej klaran gaelan (laŭ onidiroj). La estro ŝajnas montri sian nudan postaĵon al Anglujo.

### LA BELULINO DORMANTE EN LA ARBARO

Ni estas forlasontaj niajn 3 duoninsulojn (Beara, Kerry kaj Dingle) por trasulki la vojojn en la heĝan kamparon, kiu ege similas la heĝan kamparon en Normandio. Herbejoj, heĝoj, ĉevaloj, bovinoj, heĝoj, herbejoj, bovinoj, ĉevaloj... finfine ia monotoneco instalas sin, oni retrovas la samajn odorojn, mi volas diri tiun de sterkakvon. Jen la urbo Rathkeale; en la urbeto dormanta pro varmego, neniuj katoj sur la stratoj. Ĉe la horizonto ni eltrovas kastelon, ĝi ŝajnas fantomloĝata, plia kaŭzo por provi viziti la lokon. Ni trairas senkul-



turejon por malkovri la kastelon. En la vilaĝo, la nura persono, kiun ni renkontis, diris ke la loko estas loĝata de sorĉistino. Tra la pordo duone fermita, sinjorino (mi devus diri moŝtino) eliras el la kastelo. Ŝi estas strange vestita, la pantalono en la ŝtrumpetoj, ŝi deziras al ni, « bonan venon », ŝi parolas la francan, ŝi vivis en Kanado, ŝajne ŝi ne estas stulta, ŝi bonvolas ke ni vizitu la ejon sed ŝi avertas « mi vivas sen akvo, sen elektro kaj mia kastelo estas malordejo ». Timante iom, ni eniras, la loko estas plenŝtopita de ruboj, raraj rubujoj, kataroj. Bovino ne retrovus sian bovidon. Ni soriras la ŝtuparon, la ĉambroj entenas trezorojn, la biblioteko entenas librojn belege printitajn en Francio, la mebloj estas zorgege skulptitaj. Ĉe la muroj pendas familiaj insignoj, la kofroj disas. La kastelo ne estas hejtita, ĉio difektiĝas. Mi havas la impreson esti en dekoro por filmo de Agatha Christie. Mi havas aflikton pensante « ĉu estas feliĉo ? ». Mi ne havas la respondon. Ni forlasas la belulinon dormante en la arbaro, pensante pri ŝia deveno... Strangan kaj korduŝantan renkonton.

Reveno al la civilizacio. La mordanta suno sekvas nin, ventas pruen kiel kutime. Dikaj nuboj nigraj ruliĝas en la ĉielo kaj montras sin agresemaj, sed, post 2 semajnoj sunplenaj, necesas trovi la irlandajn bazojn, do, matene, sub vento senkornigonta la kokritojn, ni trairas labirinton de vojetoj sen indikpaneloj, estas kiel la trezorĉaso. Ruinaroj de kasteloj, monaĥejoj, abatejoj prisemas la kamparon, kun pelmele : Henry la VIII-a, kiu rompas kun Romo kaj trudas la anglikan riton al katolika Irlando de Sankta Patrick, la katolikaj Tudor, kiuj favoras la anglan kolonion, Elisabeth la 1-a, kiu organizas la eksterminadon de la popolo postkurita kun persisto de Charles la 1-a kaj Cromwell. Nun mi komprenas pli bone la ankoraŭ vivan malamikecon de Irlandanoj kontraŭ la Angloj.

Ni forlasas la religiajn militojn por trudenveno pli malproksima en la tempo : vojrande al Limerick, lago kaŝas sin, Louĝ Gur kaj proksime staras cirklo el 113 petroj starigitaj kaj

datiĝantaj 4000 jarojn antaŭ J-K.

Ili ŝajnas inspiri junajn perfektulojn, kiuj flustras strangajn sorĉkantojn.

Ni atakas deklivon, ian muron, ian pinglon. Statuo de « Kristo, la Reĝo protektas Glen of Aherlow-n kaj la lokan blankan monton, Galty-more Mountain (920 m).

## RUINOJ ANKORAŬ STARANTAJ

Ni atingas Cahir-n kun ĝia kastelo finmezepoka. Ni ne vizitas ĝin preferante viziti la « Swiss Cottage-n » : riverrande, tiu ĉaspavilono kun pajlita tegmento, konstruita komence de la 19a jarcento far riĉegaj burĝoj, kiuj volis imiti la « vilaĝeton de la Reĝino ». Duongiru al Rock of Keshel. Nun ni estas antaŭ la meze-



poka ensemblo, la plej spektinda en Irlando, ĝi mastras la Golden Vale-n, la vidaĵo estas vastega. La reveno okazas sub akvumado.

## TENDUMO KIEL EN KIRGIZIO

Ni renkontas la unuajn ruinojn de kirko : unu navon, kelkajn murojn, kelkajn fenestrojn. Direkto al Mitchelstown-n.

Ni haltas en Newcastel, poste ni retrovas la vojon, kiu kondukas oni ne scias kien, sed ĝi soriras, soriregas. La pejzaĝoj ŝanĝiĝas, ni forlasas la arbarojn kaj subite prezentiĝas al



ni erikeja pejzaĝo plena je erikoj. La plafono malaltas, tio donas al la tuto funebran kaj misteran etoson. La ŝafoj Suffolk kun piga kapo kaj blanka robo tute distaŭ-

zita prisemas la kamparon per iliaj blankaj flokoj. La naturo, la pejzaĝo estas grandiozaj, mi ne trovas la taŭgajn vortojn por priskribi la lokon. Pro la deklivo ni renkontas neniun kaj nenion. Irlando ne estas ebena. La vetero estas ĉagrenema, la tendumejo senorda atendas nin, vi komprenas kial mi skribis pri Kirgizio. La eŭropajn normojn, tie oni ne konas. Mi preferas silenti pri la pureco de la glaciŝranko. Nura pozitiva punkto, staras « PUB ! », iomete malpli malpura ol la tendumejo. Vi divenas : ni trinkas bierpindojn !

### ADJUDANTA ESTRINO

La tago komenciĝas piedpromene, pelante la tandemojn ĉar la eliro el la tendumejo estas kruta, necesas vidi ĝin por kredi. Rapide la pedalpremado retrovas siajn rajtojn, ĉe la supro de la ĝibo kaj ni vagas en la naturo grandioza. Direkto al la maro al Youghal trapasante la kamparon, kiun mi kvalifikus « normandian-Irlandan-heĝan kamparon ». Ne serĉu tiun vorton en la vortaro, ĝi ne ekzistas. Ni trovas malfacile la taŭgan vojon pro la indikpaneloj. Ni fiaskadas, la paneloj sur turniĝema stango indikas plurajn direktojn laŭ la vento... Feliĉe, la NURA aŭtomobilisto estas afabla kaj per la mano, li indikas kien bicikli.

La tendinstalo okazas sub akra okulo de la Adjudanta Estrino, ŝi inundas per postuloj, per uzoj kaj kutimoj :

- La viro duŝu tie, la virinoj ĉi-tie.

Ĉie la ordo regas. La estrino proponas irlandan matenmanĝon. Morgaŭe je la 8a kaj duono ni estas ĉiuj surloke por invadi la manĝoĉambron, ni manĝas pli ol necese, la estrino vidas ke biciklantoj koleraj havas malsaton kiel lupoj. Mi ne scias ĉu ŝi faris profitojn, mi pensas ne, ĉar ni postulis multege.

### LA BUKLO ESTAS BUKLITA

Ekiri sub freŝa vetero. La ĉielo minacemas, la vojtrafiko ĉefas, malproksime ni ekvidas lastfoje, la insulojn Ballycotton superstartitajn de lumturo. Ni trapasas Cloyne-n kaj atingas Midleton-n, kie okazas pied- kaj biciklurado. Ni sentas en la okuloj de gapantoj

ke ni altiras la scivolemon. Pro la lasta tago, ni deziras manĝi « lokajn specialaĵojn », la ĉielo disfalas sur ni, diluvas. La restoracio memoros pri nia veno dank'al akvospuroj sur la planko. La vetero estos tia kia ĝi estis kiam ni eniris. La porbikla vojo kaj la pramo atendas nin por nin konduki al Cork.

Reveno en la junularan gastejon. Post sekiĝo per la mansekigilo, ni decidis trinki lastajn bierojn en « pub » : prononci [pob] kiel eliranta korkŝtopilo el botelo. Komforte sidante en la duonombro, ni aŭskultas la « tradmuzikon », sed antaŭ trovi la taŭgan sonon, la kantistoj pretigas la muzikilojn : longtempe ni aŭdas [uan-tu], [uan-tu]... bonega okazo por kalkuli ĝis du. Necesas iri en dormoĉambron ĉar ni devas zorgi pri la valizoj.

### ESTAS NUR ADIAŬO

Lasta adiaŭo al Cork. La pasaĝerŝipo atendas nin... verŝajne. Antaŭ la ekiro mi avertas : "normale ni havas sufiĉe da tempo por atingi la ŝiphavenon sed oni pensu pri eventuala problemo". La amikoj ne aŭskultas, mi predikas en la dezerto, ili havas large la tempon. Tuj post miaj avertoj, spoko de la malantaŭa rado rompiĝas. Mi ridetas en miaj lipharoj kaj rememorigas miajn avertojn...sen komentarioj.

Finfine la Pont Aven malfermas sian buŝe-



gon kaj glutas nin... kiel kutime, la lastajn.

Post Roscoff [ROSKOF] ni revenas kiel ni venis, t.e. tandeme sed stirante dekstren.

Venontjare ni trauros la alian parton de Irlando.

Johano-Jakobo





Sur tiu mapo de Irlando, retrovu loknomojn, kiujn vi legis en la rakonto de Johano-Jakobo.

## PARTOPRENI EN UNIVERSALA KONGRESO

Neniu inter la esperantistoj (ĉefe francaj) ignoras, ke la 100-a U.K. okazos en Lillo en 2015.

Partopreno en U.K. estas neforgesebla sperto, sed la plej memorinda estas nedubinde la unua.

En la programo de la unua tago de ĉiu U.K. estas kunveno, kiu titolas "Unuafojaj Kongresanoj" por doni indikojn kaj konsilojn al la novuloj. Bone, sed povus okazi, ke novuloj bezonus klarigojn antaŭ ol aliĝi. Mi provos fari tion.

La unua ŝtupo estas la sendo de la aliĝo al la U.K., kiel eble plej frue ĉar la prezo altiĝas



post la 31an de Decembro kaj denove post la 31an de Marto. Oni povas sendi la aliĝilon pere de Eperanto-France.

Poste oni ricevas de U.E.A. la konfirmon de sia aliĝo, kiu entenas kodon:

*"Estimata xxxx,*

*Vi estas registrita kiel aliĝinto por la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lillo kun la kongresa numero xxx. Via UEA-kodo estas xxxxx. Dankon por via aliĝo!*

*Siatempe vi ricevos la paperajn Duan Bultenon kaj konfirmilon de aliĝo. La konfirmilon aŭ kopion de tiu ĉi mesaĝo vi nepre devas kunporti al la U.K.*

*Atentu, ke la plej freŝajn informojn pri la UK, inkluzive de la listoj de aliĝintoj, vi povas ajn-momente trovi en la retpaĝo [http://uea.org/kongresoj/uk\\_2015.html](http://uea.org/kongresoj/uk_2015.html)*

*Sincere salutas,  
Kongresa Fako de UEA"*

-dua ŝtupo :

Oni ricevas la "duan bultenon". Ĝi entenas aliĝilon por loĝado kaj ekskursoj kaj tre utilajn klarigojn (ĉefe kiam la kongreso okazas eksterlande) :

- Por eniri la landon
- Kiel atingi la kongresejon
- Utilaj informoj pri la lando kaj la urbo (mono, klimato, transporto, sanservoj...)

- **loĝado** : tie estas listo de hoteloj kaj loĝebloj kun multaj detaloj, kiuj helpas por elekti laŭ la prezo kaj laŭ la distanco ĝis la kongresejo.

- **ekskursoj** : estas 3 kategorioj

- 1) antaŭ la kongreso
- 2) post la kongreso
- 3) dum la kongreso (tuttagaj kaj duontagaj)

Por ĉiu ekskurso oni legas la celon, la tagon, la horon kaj la lokon de la eliro kaj de la reveno, la programon kaj la prezon. Notu ke tradicie la kongresejo estas fermata merkrede.

-**bankedo** : kun tago, horo, menuo kaj prezo

**Sekvas la Provizora programo**, sed la definitivan

programon oni legos en la **Kongresa Libro**.

Oni elektas loĝadon kaj ekskurso(j)n sur la aliĝilo, kiun oni sendas kun la pago.

Notindas, ke interesaj prelegoj povos okazi dum dontagaj ekskursoj. La "provizora programo, kiun vi trovos en la "Dua Bulteno" permesas scii, laŭ la tagoj, kiam okazos kursoj, paroligaj kursoj kaj ekzamenoj.

**Kiam alveni kaj kiam eliri ?**

Kompreneble tio dependas ĉu oni rezervis ekskurson antaŭ aŭ post la kongreso aŭ nur dum la kongreso.

Kiam komenciĝas la kongreson ? Ĉiam sabate : Malfermo de la kongresejo je la 9-a .

**Dum la Kongreso :**

Oni unue iras al la **Akceptejo**, se eblas antaŭ la 16-a. Tie, kun la dokumento, kiun oni ricevis por atesti pri nia aliĝo, oni viciĝas por ricevi saketon, kiu entenas dokumentojn (ĉefe la kongresan libron) kaj

Sube : paĝo de la **Kongresa Libro** de la 94-a U.K. en Bjalistoko (Pollando) de sabato la 25-a de Julio ĝis sabato la 1-a de Aŭgusto 2009.

programo	jaŭdo, 30 julio = tago de la libro													
salono/horo	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22
ZAMENHOF (1 - tendo)					Filmo: Sinjoro Tadeo			Kon- certo: Asorti 2				Koncerto: SuperNova		
LAPENNA (3 - granda atilo)	Kongresa Temo 3		Centra Oficejo Respondas		Pola Prelego 4: Stępniewski	Libroj de la Jaro		Belartaj Konkursoj						
PRIVAT (4 - 447 Mekanika)		IKU 7 (Prytz)			Legantoj de Esperanto			IKU 8 (La Torre)	Filmo: Dobrzyński 4					
BROZOVIĆ (5 - 449 Mekanika)				Esperantologia Konferenco				Strategia Forumo						
KURISU (6 - 030 Elektra Fako)							Pola Eksprese 4							
CSEH (7 - WB-18 B1)	Cseh- seminario 3		Komuna Eŭropa Referencdkadro, Ekzamenoj 1											
KABE (8 - WB-63 B)	ILEI (instru- istoj)		BEL (bahaanoj)		Araba Komisiono			Indiĝenaj Popoloj						
FIGHIERA-SIKORSKA (9 - 29 B)	TEJA (jurnalistoj)		IKUE/KELI (kristanoj)		ATEO (ateistoj; publika)									
KESÄLÄ (10 - 132 Mekanika)	Paroligaj Lecionoj edu.net K3	Paroligaj Lecionoj edu.net K3	EJA (juristoj)		AVE (verduloj)	Subkomitato 8: Scienca/ Faka Agado	Internacia Koruso 4		Un- bulismo					
SYGNARSKI (11 - 204 Mekanika)	Paroligaj Lecionoj edu.net M3	Paroligaj Lecionoj edu.net M3	Sub- komitato 7: (eŭropaj Ekst. Rilatoj)	EDE 2 (demokratoj)	MEL (muzikistoj)	Amikaro de Bruno Gröning 3	Eŭropa Agado							
BELMONT (12 - 440 Mekanika)	AIS 3 <sup>3</sup> (Sadan)		Komuna Eŭropa Referencdkadro, Ekzamenoj 2			INA (natur- kuracistoj)	BLE (budhanoj)	Mond- civitanoj	AIS 2 <sup>3</sup> (Dols Salas)					
BUJWID (13 - 27 Komputika)	E@I													
GRABOWSKI (14 - 202 Mekanika)	Libroservo 5													
ALILOKE	Bjalistokaj kaj E-aj Verkistoj (Kilińskiigo 16)		Diskuto: Esperanta literaturo - kien? (Kilińskiigo 16)			Teatraĵo: Ludo- viko - Lazaro 3 (Legionowa 5)		Libroprezento kaj Koncerto kun Karina (Legionowa 5)	Teatraĵo: Ludo- viko - Lazaro 4 (Legionowa 5)					Arta Kafejo 2 (ĝis 24h00; Legionowa 5)
ALILOKE								Koncerto: Cz'am (Ciepla 40)	Urba Akcep- to (invititoj; Fal.Branicki)	Ekspozicio Tero (urba placo)		Koncertb: JoMo (parko Planty)		

biletojn, kiun oni donos por partopreni en la ekskursoj. Se oni rezervis loĝejon oni ricevos ankaŭ indikojn por atingi sian dormoĉambron. Necesas kontroli ĉu nenio mankas en la saketon antaŭ ol subskribi la ricevateston.

je la 17-a : **kunveno por la unuafaj kongresanoj**

**Tuj kiam vi povos, trovu seĝon kaj legu la Kongresan Libron, en kiu vi trovos :**

- Mesaĝojn de Alta protektanto, de la urbestro, de la prezidanto de LKK (loka kongresa komitato). Prezento de U.E.A. kaj Centra Oficejo.
- Priskribon de la kongresejo : la kunvenoj okazas en diversaj salonoj, kiuj havas nomojn de elstaraj esperantistoj.
- **La laŭtagan programon en formo de listo kaj sub formo de tabelo** (tre utila por elekti inter kunvenoj kaj prelegoj, kiuj okazas samtempe).
- Prezento de prelegoj kaj artaj aranĝoj (ĉiuvespere okazas spektaklo, ne esperu enlitiĝi frue !)
- listo de la kongresanoj (tre utila por retrovi konatulojn, scii kongresan numeron necesas por lasi mesaĝon sur la rendevua tabulo).
- sur la lasta paĝo "La Espero", kiun vi kantas sabaton fine de la solena (kortuŝa) fermo.

.....  
(mi ne povas detale prezenti la pli ol centpaĝan "Kongresan Libron").

Post la solena fermo, venontan sabaton, ĉirkaŭ tagmeze ĉiuj (krom tiuj kiuj elektis postkongresa ekskurso) disiĝos kun agrablaj memoraĵoj kaj la espero partopreni en venontaj U.Koj.

#### PRI SIGLOJ

En la programo de la 93-a U.K. (Roterdamo), mi trovis multajn siglojn, kies signifon mi serĉis sur la retpaĝoj de U.E.A.

**U.E.A. = Universala Esperanto-Asocio**

Universala Esperanto-Asocio estis fondita en 1908 kiel organizaĵo de individuaj esperantistoj. Nuntempe UEA estas la plej granda internacia organizaĵo por la parolantoj de Esperanto kaj havas membrojn en 120 landoj. UEA laboras ne nur por disvastigi Esperanton sed ankaŭ por vekti diskuton pri la monda lingvoproblemo kaj atentigi pri la neceso de egaleco inter lingvoj.

**A.E.R.A. = Asocio Esperantista de Radio Aŭskultantoj**

**A.I.S. = Akademio Internacia de la Sciencoj**

**A.T.E.O. = Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo**

**A.V.E. = Asocio de Verduloj Esperantistaj**

**B.E.L. = Bahaa Esperanto-Ligo**

**B.L.E. = Budhana Ligo Esperantista**

**C.E.D. = Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj**

**E.D.E. = Eŭropo Demokratio Esperanto**

**E.E.U. = Eŭropa Esperanto-Unio**

**E.G.L.I. = Esperantista Go-Ligo Internacia**

**E.J.A. = Esperanta Jura Asocio**

**I.F.E.F. = Internacia Fervoja Esperanto-Federacio**

**I.K.E.F. = Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo**

**I.K.E.L. = Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj**

**I.K.U. = Internacia Kongresa Universitato**

**I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista**

**I.L.E.I. = Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

**I.L.E.R.A. = Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj**

**I.N.A. = Internacia Naturkuraca Asocio**

**K.A.E.M. = Komisiono pri Azia Esperanto-Movado**

**K.E.L.I. = Kristana Esperantista Ligo Internacia**

**L.I.B.E. = Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj**

**L.K.K. [lokoko] = Loka Kongresa Komitato**

**L.S.G. = Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

**M.E.L. = Muzika Esperanto-Ligo**

**S.A.T. = Sennacieca Asocio Tutmonda**

**S.E.G. = ????** (mi ne trovis !)

**T.A.D.E.N. = Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj**

**T.E.Ĵ.A. = Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio**

**T.E.J.O. = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo**

**T.E.V.A. = Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio**

**U.K. = Universala Kongreso**

**U.M.E.A. = Universala Medicina Esperanto-Asocio**

**V.E.K. = Veterana Esperantista Klubo**

*Mi esperas, ke tiuj klarigoj utilos ĉefe al tiuj, kiuj estos "unuafaj kongresanoj".*

*Se vi ne povos partopreni en 2015, sciu, ke venontan jaron, la 101-a U.K. okazos en Nitra, urbo de Slovakio.*

*Se restas demandoj, ne hezitu, plezure mi respondos al vi.*

*Jacques Gaumé*



## KAŜTANSUPO



200g da senŝelitaj, kuiritaj (en salita akvo) kaŝtanoj.

2 terpomoj.

2 kuboĵoj por kortobirdaĵa buljono.

1 litro da akvo

1 aŭ 2 partoj da fromaĝo "bovino, kiu ridas" (fandita fromaĝo)

Metu la 2 kuboĵojn da kortobirdaĵo en bolantan akvon.

Aldonu la terpomojn tranĉitajn en pluraj pecoj kaj la antaŭajn kuiritajn kaŝtanojn.

Kuiru ĝis la terpomoj estu sufiĉe molaj.

Aldonu fromaĝon.

Miksu la tuton kaj aldonu iomete da akvo se la tuto estas tro densa.



## ENTREO : SPINACA SALATO

Junaj spinacaj folioj

Raspita « pecorino » (Itala fromaĝo) aŭ raspita parmezano.



Olivoleo.

Vinagro de vino aŭ balzama vinagro.

Salo, pipro, mustardo.

Raspitaj aveloj kaj aveloj.

Eltiru la dikajn petiolojn da spinacfolioj.

Lavu kaj elgutigu ilin.

Metu ilin en ujon.

Aldonu la raspitajn fromaĝon kaj avelojn.


Preparu vinagran saŭcon kaj aldonu lastmomente al la salato.

*Jeannine kaj Gérard Layseman*



## PIRAMIDO

Je ĉiu paŝo aldonu unu literon kaj, se necese, ŝanĝu lokojn de aliaj.



1 Vokalo

2 Konjunkcio

3 Cifero

4 Monunuo en iuj Sud-Amerikaj landoj

5 Loĝanto de Persujo

6 Atendo, kun fido, la realigon de tio, kion oni deziras

7 La lasta parto de la tago, kiam la suno subiras sed ankoraŭ ne malaperis.

8 Fluganta mambesto

*(Solve sur venonta Turanĝia Luko)*

*Bérengère Turbillon*

Centre Culturel Esperanto Touraine

Halles de Tours

Place G. Paillhou

37000 TOURS

Tel : 02 47 44 62 12

esperanto-touraine37@wanadoo.fr